

Kongresa Kinejo, 9-a de aŭgusto 2022


Beauchemin, mardo, 9-a de aŭg.; 13:30-14:00: Indiĝenaj filmoj en Esperanto: filmoj de Nacia Film-Oficejo

Kelkaj elstaraj filmoj de indiĝenaj filmfaristoj, produktitaj de Nacia Film-Oficejo de Kanado: Spiroj, Revivigi la Nakotan Lingvon, Tri Mil.

Spiroj (*Breaths*)



En ĉi tiu mallonga dokumenta filmo, inuka kantisto-komponisto Susan Aglukark rakontas pri arto, familio kaj aparteno dum ŝi esploras la kompleksajn kulturajn ŝanĝojn de la lastaj 50 jaroj da inuita vivo. Turnante ŝian lenson sur la perturboj de kolonia transiro, direktoro Nyla Innuksuk ekzamenas la fortojn kiuj formis la voĉon de Aglukark kaj kiel tiu voĉo nun estas tiom grava por nova generacio de inuitaj artistoj. Daŭro: 4 min.



Revivigi la Nakotan Lingvon (*To Wake Up the Nakota Language*)

"Kiam vi ne konas vian lingvon aŭ vian kulturon, vi ne scias, kiu vi estas," diras 69-jaraĝa Armand McArthur, unu el la lastaj fluaj nakotaj parolantoj en la nacio Pheasant Rump, Saskaĉevano. Per la saĝeco de liaj vortoj, Armand estas favora al revigligado de sia lingvo kaj kulturo por sia komunumo kaj la estontaj generacioj. Daŭro: 6 min.

Tri Mil (*Three Thousand*)



En ĉi tiu mallonga animacia filmo, inuka artisto Asinnajaq plonĝas nin en subliman imagitan universon — 14 minutojn da brilanta filmo, inspirita de arkivaj materialoj. Ĝi kunfandigas la nunon, pasintecon kaj estontecon de ŝia popolo en radian novan lumon. Sen vortoj.

Solis, mardo, 9-a de aŭg., 16:45-18:00: Indiĝenaj filmoj en Esperanto:
Wapikoni Mobile



Ĉiujare ĉ. 300 indiĝenaj gejunuloj partoprenas en atelieroj kaj kreas ĉ. plurajn dekojn da mallongajn filmojn kaj muzikaj verkoj, kadre de la Wapikoni Mobile -- neprofitcela organizo bazita en Montrealo. Wapikoni Mobile vizitis ĉirkaŭ 30 naciojn en Kanado kaj ankaŭ ekster Kanado kaj produktis pli ol 1000 mallongajn filmojn kaj pli ol 600 muzikaĵojn, donante parolon al pli ol 4 mil indiĝenaj gejunuloj. La LKK partneriĝis kun Wapikoni Mobile por montri al kongresanoj kolekton de 16 filmoj el 7 diversaj nacioj. Tradukis: Stéphanie Brault. Helpis subtitoligo: Rogener Pavinsky.

Aitun: Josephis kaj Nashtash, maljunulparo de La Romaine, dividas sian sciadon pri la innua kulturo per la senplumigado kaj preparado de mol-anasoj. Filmite en: Unamen Shipu (Kebekio). Daŭro: 6 min. Filmisto: Kevin Bellefleur. Nacio: Innu.

Batloj (Bataille): Krepuske, Karen decidas forlasi la feston, en kiu amikino estas perdiĝonta. Batalo, kiel metaforo pri la vivo. Filmite en: Uashat Mak Mani-Utenam (Kebekio). Daŭro: Ĉ. 4 min. Filmisto: Karen Pinette Fontaine. Nacio: Innu

Voko kaj respondo (Call and response): Nuntempa kaj tradicia muzikoj dialogas. Daŭro: Ĉ. 5 min. Filmisto: Craig Commanda. Nacio: Anishnabe.

Mi portas mian kulturon (Wearing My Culture): En inuitaj komunumoj, oni fieras pri la fasono kaj portado de vintraj vestaĵoj. Thomassie substrekas la ligojn estigitajn de vestaĵfarado ene de familioj, en la kulturo kaj en la vivmedio. Filmite en: Kangirsuk (Kebekio - Nunavik). Daŭro: Ĉ. 3 min. Filmisto: Olivia Lya Thomassie. Nacio: Inuit.

La granda sinjorino de atikamekoj (La grande dame atikamekw): Por la Atikamekoj, gravas vivi harmonie kun Nitaskinan, la teritorio, sub tradicie virina gvidado. Laŭ tiuj principoj, Kokom Cotit regis super sia familia teritorio. Filmite en: Manawan (Kebekio). Filmistoj: Éliane Moar kaj Sipi Flamand. Daŭro: 5 min. Nacio: Atikamekw.

Kuujjuaq: Eseo-videaĵo: la rigardo de junulo pri sia naskiĝurbo. Filmisto: Sammy Gadbois. Filmite en: Kuujjuaq. Daŭro: 5 min. Nacio: Inuit.

Amendo (L'amendement): Kvar generacioj. Tri internulejoj. Du kulturoj. Unu formorto. Filmisto: Kevin Papatie. Filmite en: Kitcisakik (Kebekio). Daŭro: 4 min. Nacio: Anishnabe

La infano, kiu enbatis najlojn (L'enfant qui plantait des clous): Fable ombroluda pri la konsekvencoj de onia agado. Filmisto: Isabelle Kanapé. Filmite en: Pessamit (Kebekio). Daŭro: 3 min. Nacio: Innu.

Komencantoj (Les débutants): En Unamen Shipu, virinoj decidas starigi ĥoron. Dirite (ne tuj) farite... Filmisto: Rachel, Béatrice kaj Gisèle Mark. Filmite en: Unamen Shipu (Kebekio). Daŭro: 4.5 min. Nacio: Innue.

Mahiganiec: Aniŝnabea virino provas malsovaĝigi knabineton, kiu kreskis meze de lupoj. Filmisto: Jacqueline Michel. Filmite en: Kitcisakik (Kebekio). Daŭro: 5.5 min. Nacio: Anishnabe.

Ni levos nin (Nous nous soulèverons): Per spirkaptaj versoj, la talenta innua poetino Natasha Kanapé Fontaine instigas nin ribeli por prilumi la mondon. Filmisto: Natasha Kanapé Fontaine. Filmite en: Montrealo. Daŭro: 4 min. Nacio: Pessamit.

Neio pri mokasenoj (Rien sur les mocassins): Ne, filmon pri mokasenoj mi ne faros! Filmisto: Eden Malina Awashish. Filmite en: Opitciwan (Kebekio). Daŭro: 3 min. Nacio: Atikamekw.

Reĝo de birdoj (Roi des oiseaux): Kiu estos la reĝa reprezentanto de la birdoj, Ĉu la aglo aŭ la kolimbo? Filmisto: Donovan Volland. Filmite en: Uashat Mak Mani-Utenam. Daŭro: 3 min. Nacio: Innu.

Brilanta objekto (Shiny object): La indiĝenaj kulturo kaj mondkoncepto por kontraŭi la falsajn brilaĵetojn de la nuntempo. Filmisto: Kevin Tikivik. Daŭro: 5 min. Nacio: Inuit.

Wamin: En la atikameka, «wamin» signifas «pomo». Oni uzas la vorton insulte al tiuj, kiuj iras vivi eksterrezerveje, ĉar ili esta ruĝaj ekstere, sed blankaj ene. Filmisto: Katherine Nequado. Daŭro: 3 min. Nacio: Atikamekw.

Mi memoras (I remember): Virino memoras pri la pejzaĝo, sonoj kaj odoroj de sia infanaĝo. Filmisto: Crystal Dawn Jerome. Filmite en: Gesgapegiag (Kebekio). Daŭro: 3 min. Nacio: Mi'gmaq.